V-22562/1931 r.

Eldonnombro 5000. Sekvonta numero aperos en marto 1932.

# LA KOMERCO

Oficiala Bulteno de Komercista Esperanto-Unio
Centra Oficejo: Dresden/Radebeul, Friedrich-Auguststr. 4
Agentejoj en: Addis-Abeba, Baden (Svis.), Bilbao, Cardiff, Hvamstanga, Lodz, Osaka, Paris, Plauen i. V., Ploesti, Recht, Ruse, Shanghai, Sourabaya, Tabriz, Utrecht, Vraca
La bulteno estas sendata al niaj agentoj kaj klientoj senpage; neklientoj kaj nekomercistoj povas aboni por RM 0.25 po numero. La bulteno aperas laŭbezone.

Numero 16 + Eldonita en novembro 1931

## Mondfamaj firmoj kaj germana urbo uzas la servon de KEU!

### Al niaj legantoj.

Nia decido, eldoni nian bultenon en pli granda nombro (5000 ekzempleroj) alportis al ni la esperitan sukceson. Malgraŭ la tutmonda krizo multaj novaj klientoj komencis la negocajn interrilatojn kun ni, respektive uzis nian peradon. Eble ja ĝuste pro la krizo kaj pro la ĉiea voko al ŝparado, al ekonomieco, al raciigo, tiuj novaj klientoj aliĝis al KEU. Ĝojige estas, ke eĉ ne-Esperantistaj firmoj — eĉ el Nov-Fundlando kaj Meksiko — sendis mendojn al ni. Ankaŭ unu el la plej gravaj germanaj cigarfabrikoj petis niajn servojn por aĉeto de traganto en Persujo. Vidante tiun fakton, ni supozas, ke ĉie per lerta agado estas atingebla sama sukceso, kaj ni denove petas niajn legantojn, diskonigi inter la komercistoj, ke ekzistas Esperanta entrepreno, kiu estas je ĉies dispono kaj ke oni povas aĉeti per ĝi plej malmultkoste, ĉar ĝi estas la plej moderna internacia entrepreno, uzante ne la antikvajn metodojn de komplikiga, multkosta plurlingveco, sed nur unu solan lingvon, kaj sekve ŝparas, en la intereso de la klientoj, nenecesajn kostojn.

Por via propagando ni hodiaŭ publikigas, kiel jam en numero 14, ekzemplon el la praktiko, kiu klare montras la necesecon de klara komerca lingvo. En franclingva gvidlibro tra Budapeŝto oni povas legi: „J'ai trouvé, que nulle part on ne danse mieux qu'ici, dans des salles de danse luxurieuses"; kio signifas: „Mi trovis, ke nenie oni dancas pli bone ol tie en la dancĉambroj **malĉastegaj**." Oni intencis diri „luxuriantes" t. e. luksaj laŭ aranĝo, kaj diris malĝuste „luxurieuses", vorto devenanta de „luxure" (malĉastegeco). Bona reklamo por uzo de nacia lingvo en internaciaj rilatoj, ĉu ne?

(Ni petas, sendi tekstojn kun tiaj malkorektaĵoj, kiujn oni hazarde trovis.)

### Ekonomiaj raportoj.

**Germanujo.** (Kontrolita de la Komerca Ĉambro Dresden.) La tutmonda krizo atingis en la lastaj monatoj en Germanujo kaj Anglujo „historian" punkton. Oni devis fermi por kelkaj tagoj la bankojn kaj borsojn, kaj la angla pundo, laŭ kiu kalkulis multaj komercaj branĉoj en la tuta mondo kaj al kiu la tuta mondo nepre fidis, falis je 20% en sia valoro. Pri la kaŭzo regas diversaj opinioj. Larĝe estas kulpa la ĝenerala malfidado. Tiu perdo de fido certe kreiĝis el la necerteco pri la estonteco de meza Eŭropo. Pro la gigantaj, troaj pagoj de reparacioj, kiuj forprenis de kelkaj landoj pli da kapitalo kaj devizoj ol povis esti enspezataj per eksporto, la oro kolektiĝis en kelkaj landoj kaj komencis manki en aliaj. Per tio unua ĝermo de „necerteco" kaj malfido naskiĝis. Ni esperas, ke pro la fakto, ke ĉiuj landoj same komencis suferi, oni serĉos kaj trovos solvon kaj venos al pli harmonia kunlaborado kaj pliboniĝo. Eble la modela disciplino, kiun montris la angla kaj germana popoloj dum la krizaj tagoj, estas la unua faktoro pri la restarigo de la perdita fido.

La aktivsaldo de la germana kuneksterlanda komercbilanco daŭris kreski. Jen la lastaj ciferoj (en milionoj da Reichsmark):

| | importo | eksporto | aktivsaldo |
|---|---|---|---|
| Majo | 599.8 | 746.8 | 146.9 |
| Junio | 607.4 | 713.5 | 106 |
| Julio | 562.6 | 792.2 | 229.6 |
| Aŭgusto | 454.3 | 776.5 | 322.2 |
| Septembro | 448.4 | 811.8 | 363.2 |
| Januaro ĝis Septembro | 5271.4 | 6898.6 | 1627.2 |

La bilanco montras ja kontentigajn ciferojn, sed estas entenata multe da eksporto deviga pro la malbonaj situacioj. La enlanda merkato estas tre malforta pro la grandega nombro da senlaboruloj (rondcifere 4½ milionoj en Oktobro).

La financa situacio estas tiel, ke „teknike" la konataj malfacilaĵoj estas venkitaj. Por havigi la bezonatajn devizojn por la interkonsentita iom-post-ioma repago de la eksterlandaj kreditoj, la registaro dekretis severajn regulojn kaj kontrolojn de la devizmerkato.

Inter la germanaj industrioj la artsilka, la teksa (teksaĵoj, ŝtrumpoj, gantoj kaj aliaj bezonaĵoj), raportis pri pliviglIĝo de la merkato, dum ke la aliaj industrioj, ĉefe la maŝinindustrio, plendas pri nesufiĉa okupo. Bone estas okupata la radio-industrio, ĉar la tre altkvalitaj produktoj de la germanaj radiofabrikoj estas serĉataj en la tuta mondo.

**Raporto el Bulgarujo** (de KEU Ruse). La ekonomia krizo estas forte sentebla, ĉar la plimulto de la loĝantoj estas terkulturistoj, kaj terproduktoj estas tro malkaraj. La nova registaro projektis planon por malakrigi la krizon. Unu el la projektoj estas la revizio de la dogantarifo, por pliviggligi la importon kaj eksporton.

**Polujo** (de KEU Lodz).

| | Januaro—Aŭgusto |
|---|---|
| Importo (en milionoj da Zloty) | 932.775 |
| eksporto (en milionoj da Zloty) | 1432.987 |

La plej gravan rolon en la eksporto ludas la manĝproduktoj (336.074) kaj la brulmaterialo (karbo, benzino, nafto) (217.349). La haveno Gdynia partoprenis en la importo per 21,6% en la eksporto per 24,4%. De Januaro ĝis Septembro alvenis tra Gdynia 457.551 tunoj kaj eliris 3310.272 tunoj da varo. La ĝenerala situacio ekonomia estas, samkiel en aliaj landoj, malbona. La ĉefa kaŭzo estas la manko de vendmerkatoj. Pro tio la nombro da senlaboruloj estas alta kaj atingis 300 000.

**Holando.**

| | Aŭgusto | Septembro |
|---|---|---|
| Importo (en milionoj da guldenoj) | 148 | 153 |
| eksporto (en milionoj da guldenoj) | 107 | 120 |

**Italujo.** Post longa tempo unuafoje la import/eksportbilanco estas aktiva kun 31 milionoj da Liroj.

**Francujo.** Importo dum la unuaj 9 monatoj 1931 (en milionoj da francaj frankoj) . . . 33.373
eksporto . . . 23.405

**Svisujo** (de Komercista Esperanto-Unio Baden). Ĉar la monda krizo indulgas neniun parton de la tero, estas nature, ke oni an-

kaŭ de ĉie povas ion rakonti pri ĝia efiko. Ĝi komencis sentiĝi ĉi tie nur en la dua kvaronjaro, tiamaniere, ke mendoj forestas kaj tial senlaboreco ekkreskas. Dum ke, je la jarkomenco, oni apenaŭ povis paroli pri senlaboreco, ĝi nun jam atingis la proksimuman ciferon 65 000. Pleje suferas la industrioj teksa kaj horloĝa, kaj de ĉirkaŭ du monatoj la maŝinindustrio ekpaŝis sur du vojoj: oficistojn kaj laboristojn aŭ oni eksigas, aŭ daŭrigas ilin „okupi", sed malaltigas la salajrojn. La kurzo de la svisa franko estas ĉiam stabila spite tiujn aperaĵojn, ĉar la svisa orbazo permesus eĉ triobligi la nun cirkulantan paperan monon. La negocado samkiel la fremdultrafiko stagnas, ĉar la malfido pri la estonteco retenemigas intencojn kaj decidojn, kio kompreneble ne helpas, sed pligrandigas la jaman ĥaoson tutmondan.

## Administraj sciigoj.

Ni malfermis novajn agentejojn:

Komercista Esperanto-Unio, Udine (Italujo), Piazzale Palmanova 2,
Komercista Esperanto-Unio, Praha (ĈSR.), Revolučnį 3.

Jen la adresoj de la aliaj agentejoj, kiuj bone funkcias:

Addis-Abeba (Etiopio), Boîte postale 185,
Baden (Svis.), Poŝtfako 275,
Hvammstanga (Islando), sen adreso,
Lodz (Polujo), Radwanska 6,
Osaka (Japanujo), P. O. Box 20,
Plauen i. V. (Germ.), Krähenhügelstrasse 13,
Recht (Persujo), Sraje Gulŝen,
Ruse (Bulgarujo), Str. Saraolu 27a,
Sourabaya (Javo), Postbox 81,
Utrecht (Nederlando), Hamburgerstr. 16,
Vraca (Bulgarujo), ul. Knjaĵevska 76.

Helpantoj en Paris, Shanghai, Ploesti, Cardiff, Tabriz, Bilbao.

**Himno-disko.** Tre rapide elvendiĝis la unua serio de 550 ekzempleroj. Ankaŭ la dua serio baldaŭ estos elĉerpiĝinta. El la multaj laŭdoj alvenintaj ni vidis, ke ĉie la disko estis akceptata kun granda kontenteco.

Ni tial intencas, **daŭrigi la eldonon de Esperantaj diskoj** kaj projektas eldoni baldaŭ **duan diskon** kun du muzikaĵoj, kantitaj en Esperanto, laŭ elekto de la antaŭmendantoj! Skribu tuj se vi aĉetus tiun novan diskon kaj notu, kiun kanton vi proponas. **Kiu antaŭmendas ĝis la 30-a de Novembro, ricevos la diskon kun 20% da rabato, aŭ kun senpaga aldono de 200 stiftoj! Ĉiu grupo posedu niajn diskojn por prezentado ĉe festoj, en radio kaj kunvenoj!**

## Novaj sukcesoj de KEU. — El la praktiko.

Dum la somero ni iom limigis nian propagandan laboron. Sed nun ni denove komencis kaj ni sukcesis interesigi pri nia afero kelkajn tre gravajn firmojn, el kiuj unu eĉ estas mondkonata! Provas nun unuan fojon la efikon de reklamo per KEU la mondkonata firmo.

**AEG — Allgemeine Elektrizitäts-Gesellschaft, Berlin NW 40,** de kiu ni sendas al ĉiu, kiu ricevas „La Komerco" per la poŝto, reklamon pri „Turbinamo". (Vidu pri ĝi sub „novaĵoj" kaj „ofertoj".)

**Elite-Diamantwerke, A. G., Siegmar i. Sa. (Germ.)** sammaniere dissendigas prospekton pri la treege praktika kaj malmultkosta motorciklo kun malpeza motoro kaj krome mendis anoncon.

**August Horvath, Klotzsche bei Dresden,** same dissendigas prospektojn pri „POMPEX".

**Dresden-Leipziger Schnellpressenfabrik, Coswig b. Dresden** mendis anoncon (fabriko de plej modernaj presmaŝinoj).

**La urbo Oederan** mendis anoncon.

Samideanoj! La firmoj certe eldonos Esperantan reklamon kaj enkondukos nian lingvon, se vi komprenas, kion vi devas fari! Do, ne ignoru nian sciigon, sed . . . tuj skribu al la firmoj aŭ al ni kaj mendu aŭ almenaŭ demandu detalojn kaj atentigu viajn komercistojn pri la treege interesaj varoj.

**SOS-voko.** En n-ro 15 ni raportis pri grava sukceso. La ŝtata Meissen-a porcelanmanufakturo, Meissen, enkondukis Esperantan korespondadon kaj prove mendis anoncon! Ni urĝe petis, varbi aĉetantojn por la manufakturo kaj postuli oferton! Kia rezulto! Neniu skribis al Meissen! Ni urĝege petas, fari tuj la necesajn paŝojn kaj agi same ĉe ĉiuj firmoj, kiuj anoncis.

## Teknikaj kaj aliaj novaĵoj. Atentindaj artikloj.

**Plibonigo de violonoj.** Germana fakulo eltrovis specialan sistemon, per kiu li sukcesis, doni eĉ al malmultkostaj violonoj mirinde belan sonon. La sistemo bazas sur la principo, ke perfekta harmonio nur povas estiĝi, se ĉiuj partoj de la violono oscilas en harmonia ritmo. Tio estas nur atingebla per ĝusta harmonio de la diversaj partoj. Oni plibonigas laŭ tiu sistemo alsenditajn violonojn kaj liveras novajn je treege malalta prezo. Oni estos surprizata, kiom bonege ili sonas. (Vidu oferton!)

**Gardilo kontraŭ poŝ-ŝtelistoj.** Gardilo en formo de prembutono, facile fiksigebla en vestaĵoj, al poŝoj, sakoj ktp. Per ĝi la objekto estas fikse fermata aŭ ligata, kaj nur tiu, kiu scias la precizan punkton, al kiu devas esti ŝovata malgranda levilo, sukcesas malfermi tiun butonon! Oni serĉas vendistojn en la tuta mondo.

**Mastrumejaj pupoj.** Estas enmerkatigataj tre plaĉaj pupoj, kies robo, jako, mantelo ktp. estas faritaj el polur- kaj viŝtukoj, bezonataj por dommastrumado. Tiuj pupoj certe trovos ĉie interesatojn, ĉar ili kunigas praktikecon kun originaleco. Vidu oferton!

**„Turbinamo"** estas la nomo de treege praktika, taŭga generatoro por memfari elektran fluon helpe de turbino. Ĉie kie estas fluanta akvo (rivero, akvofalo, rivereto), facile estas instalebla tia elektrejo, konsistanta el turbino, kuplita kun generatoro, kies tensio restas konstanta spite al neregula fluo de la akvo. (Patentita inventaĵo.) Interesatoj postulu precizajn informojn. Pri proksimumaj prezoj vidu sub „ofertoj".

**„Pompex" pumpilo por aŭtomobil-pneŭmatikoj.** Grava novaĵo, treege praktika, nepre bezonata de ĉiu aŭtomobilisto. Per ĝi oni facile povas rapidege kaj plenplene plenigi je freŝa aero la aertubojn. La pneŭmatikoj estas tiom plenpumpitaj, ke pro tio la forkonsumiĝo estas treege reduktata. La pumpilo estas laŭforme kaj laŭgrande kiel normala eksplodiga kandelo kaj estas alŝraŭbata anstataŭ ĝi. Per la motoro la aertubo estas nun tute plenigata en 3—4 minutoj je garantie pura kaj freŝa aero. Vidu oferton!

**Praktika aranĝo por fiksigi rapide kaj sen peno kurtenojn.** La aranĝo konsistas el risorto etendebla ĝis 90 cm (resp. la pli granda ĝis 3 m). La risorto estas surigebla sur lignan aŭ metalan rondan stangon kaj en distirita stato fiksigata resp. tenata per alnodita ŝnuro. La kurtenoj estas alpinĉataj al pinĉiloj, elpendantaj de la risorto. Laŭvole la risorto estas remetebla en neetenditan staton kaj per tio la kurteno kunfaldiĝas. Vidu oferton!

## Niaj ofertoj.

La prezoj estas la originalaj prezoj de la liverantoj, ili estas nedevigaj por ni. Por kovri niajn elspezojn, ni — respektive niaj agentoj — alkalkulos makleraĵon de 1‰ ĝis kelkaj procentoj, laŭ grando de la mendo.

La hodiaŭaj ofertoj nur prezentas parton el multo, pri kiu ni disponas.

Oferto N-ro 543. **Stebitaj litkovraĵoj.** Grando: 130×190 cm, supra parto el sateno, dorsflanko el trikoto, kun kotona plenigaĵo, RM 10.25. Ambaŭflanke sateno, RM 11.85. Sama, kun duonlana plenigaĵo, RM 15.25. Kun lana plenigaĵo, supra flanko sateno, malsupra trikoto, RM 15.25, ambaŭflanke sateno, RM 17.35, supre desegnita sateno, dorsflanke sendesegna, RM 20.50.

Kun griza lanuga plenigaĵo: ambaŭflanke sateno, RM 63.—. La sama, kun interŝtofo, RM 68.25. Pli bona kvalito (blankaj lanugoj) RM 78.75 kaj RM 84.—. Sublitoj RM 12.10 ĝis RM 16.80. Loko Dresden.

Oferto N-ro 371. **„Pompex", Aŭtomata aerpumpilo por aŭtomobiloj.** Prezo inkl. 4 m longan kaŭĉukan tubon, RM 16.— la peco. Por revendistoj RM 11.20, por pograndistoj RM 8.96 FOB Hamburg inkl. pakumaĵon.

Oferto N-ro 544. **„Novari-violonoj“.** Prezo: violono RM 70.—, aldviolono RM 90.—, violonĉelo RM 180.—, Koncertviolonoj, laŭvice kiel antaŭe, RM 160.—, RM 200.—, RM 290.— kaj pli. Rabato por vendistoj 25%. Prezoj loko Dresden, ekskl. pakumaĵon. Plibonigo de malnovaj, laŭvice kiel supre, RM 30.—, RM 40.—, RM 60.—.

Oferto N-ro 545. **„Turbinamo“.** Instalaĵo por memfaro de elektra fluo, konsistanta el turbino, barŝovilo, dinamo, distributabulo kaj serio da rezervpartoj, (2 feraj reostatoj, 1 serio da karbbrosoj, 1 serio da globlagroj, 1 serio da sekurigiloj). Prezo (dependa de falalteco de la akvo kaj potenco de la dezirata dinamo), inter RM 2175.— kaj RM 7000.—. Loko fabriko Stuttgart (Germ.) ekskl. pakumaĵon.

Oferto N-ro 546. **Antaŭtukoj el kaŭĉuko.** Praktika artiklo. Prezo: serio I, simple ornamitaj, RM 7.20 la dekduo, serio II, fortikaj, ornamitaj per ruŝoj, surpresitaj, RM 12.— la dekduo; serio III. fortikaj porlaboraj antaŭtukoj, unukoloraj, RM 15.— la dekduo. Loko fabriko germana.

Oferto N-ro 547. **Porteblaj gramofonoj** de simpla ĝis luksa farmaniero. Prezo de RM 9.— ĝis RM 70.—, loko germana fabriko. Por grandkvantaj mendoj FOB Hamburg. Postulu ilustritan katalogon.

Oferto N-ro 533. **Kemie preparitaj polurtukoj** por metaloj. Tiuj tukoj poluras bonege sen iu fluidaĵo. Prezoj: kvalito 1202, por 100 pecoj RM 43.— (proks. 38×50 cm); RM 28.50 (proks. 30×40 cm); RM 21.— (proks. 26×30 cm). Loko germana fabriko. Ĉiu tuko aparte enpakita en papersakon kun surpreso en Esperanto. Ĉe grandaj mendoj ankaŭ en ĉiu alia dezirata lingvo.

Oferto N-ro 533a. **Pupoj el mastrumaĵaj artikloj** (ekz. polurtukoj, purigtukoj, potpurigilo ktp.). Prezo: por N-ro 1208/J (5 objektoj) en blanka kartona skatolo RM 85.— por 100 pecoj, loko germana fabriko. Haveblaj estas proks. 20 diversaj kombinaĵoj ĝis RM 200.— por 100 pecoj.

Oferto N-ro 548. **Sekurigaj butonoj** kontraŭ ŝteloj.

Butonoj alfiksigeblaj al dokumentujoj . RM 100.80 por 100 pecoj
Butonoj alfiksigeblaj al porsinjorinaj vizitsakoj „ 82.60 por 100 pecoj
Butonoj alfiksigeblaj al leterujoj . . . „ 77.40 por 100 pecoj
Butonoj alfiksigeblaj al ĵaketoj . . . . „ 70.10 por 100 pecoj

loko germana fabriko, ekskl. pakumaĵon. Pli grandaj kvantoj estas rabatataj.

Oferto N-ro 549. **Sportĉapoj** el lano aŭ lano kun artefarita silko por sinjorinoj, asortitaj en diversaj koloroj, dekduo RM 5.00 kaj RM 6.—. Malgrandaj specimensendoj volonte sendataj. Loko germana fabriko.

Oferto N-ro 550. **Tirrisorto** por rapida alfiksigo de kurtenoj al stango. Prezo: por risorto, distirebla ĝis 90 cm, RM 0.85, provizita kun 7 pinĉiloj; distirebla ĝis 3 m, kun 19 pinĉiloj, RM 2.50 la peco, ĉiu enpakita en kartonan skatoleton loko germana fabriko, ekskl. transportkeston.

Oferto N-ro 551. **Orelŝirmiloj** (varmigiloj) kun ŝovebla ŝtala arko.

El nigra felto kun ruĝa flanela subŝtofo . RM 2.25 la dekduo
El nigra veluro kun ruĝa velura subŝtofo . RM 2.45 la dekduo
El griza veluro kun ruĝa velura subŝtofo . RM 3.70 la dekduo

La samaj kun aŭdmembrano RM 0.30 pluso por dekduo.

Prezoj validas FOB Hamburg aŭ Bremen. Enpako: 12 paroj en kartona skatolo. Por enpako de ĉiu peco en papersakon, RM 0.15 pluso por dekduo.


Oferto N-ro 552. **Rozburĝonaj garnaĵoj** (Rosebud Trimings) el artsilko en tre diversaj kolorsortimentoj. RM 5.— ĝis RM 25.— por 100 metroj, loko fabriko. Laŭdezire estas sendataj malgrandaj provsendoj, indiku por kiom da RM vi deziras.

Oferto N-ro 553. **Ŝraŭbtirilo kun ŝraŭbtenilo.** Praktika ilo speciale por uzado en okazoj, en kiuj oni devas fiksigi ŝraŭbon en mekanismo, radaro, radioaparato. Prezo por ĉiu peco RM 1,20 ĝis RM 1,60 (laŭ grando de la tirilo).

Oferto N-ro 554. **Ĉarmaj poŝoj** plektitaj el basto. Prezo ĉeĥaj kronoj 2.— ĝis 13.—, loko Ĉeĥoslovaka fabriko.

Oferto N-ro 555. **Aeroplanmodeloj.** Gravega instruilo! Ĉiu aeroplana modelo havebla! La helico estas movata per kaŭĉuka rubando, la pli multkostaj per motoreto. Postulu katalogon! Prezoj de RM 3.50 ĝis RM 475.—. Rabato 33⅓%.

Oferto N-ro 556. La plej modernaj **radio-aparatoj.** MENDE 169 RM 169.—, serio da 4 valvoj RM 64.—. MENDE 250, Bendfiltra ricevilo kun unubutona absoluta agordado RM 250, la valvoj RM 108.50. Revendistoj ricevas grandan rabaton.



Oferto N-ro 557. **Laŭntenisaj artikloj.** „Olmar“ laŭntenisaj rakedoj, Dolaroj 2,—/14,—. „Okmar Tournament“ speciala rakedo por ĉampionoj, $ 12,—. Skioj „Olmar“ el plej bona frakseno, de $ 2,50 (sen ligaĵo). Loko pola fabriko, sen pakumaĵo. Pri detaloj skribu al KEU LODZ.

Oferto N-ro 558. **Herbaĵa pulvoro „Mönchol“**, unika medikamento, kunmetita el nevenenaj herbaĵoj: N-ro 1 kontraŭ galsuferoj, galvezika inflamo, galŝtonoj, gal- kaj rensablo; N-ro 2 kontraŭ arteriosklerozo, korsuferoj, duonsvenoj; N-ro 3 kontraŭ anemio, reŭmatismo, stomaksuferoj; N-ro 4 kontraŭ diabeto. Prezo por skatolo RM 3.50 afrankite.

Oferto N-ro 559. **Svisaj poŝhorloĝoj** kun sufiĉe bona mekanismo, taŭgaj kiel donaco al lernejaj knaboj kaj kiel uzhorloĝo, kiam pli bonan oni ne ŝatas havi kun si (montsporto). Sendebla en du fojoj kiel specimeno sen valoro por eviti la dogankostojn. Prezo: Svis. Frankoj 2.10 afrankite de KEU BADEN (Svis.). Antaŭpagu!

Oferto N-ro 560. **Originalaj kantoj** en Esperanto. Kajero N-ro 1: Telefonu 2—45, muziko de la lerta pola samideana verkisto Feliks Hiller. Prezo 1 resp.-kupono. (Eldonitaj de KEU-Lodz.)

Oferto N-ro 561. **Malofta abesiniaj poŝtmarkoj**, ⅛, ¼ kaj ½ Mehalek kun surpreso: „Mayle Selassi le 3 Avril 1930“ (nestampitaj). Serio de tiuj tri markoj RM 2.— afrankite.

Oferto N-ro 562. **Kukol-horloĝoj.** Ŝatata artiklo. Prezo de RM 1.20 (sen kukolvoko) ĝis RM 6.90 kun kukolvoko. Demandu bildkatalogon. Prezoj en la bildkatalogo validas loko germana fabriko, ekskl. pakumaĵon kaj ekskl. pezaĵojn. La pezaĵoj kostas RM 0.45 la kilogramo. La pakumaĵo kostas 3%, por transmaraj landoj 5% de la faktursumo. Rabato 10% por pograndistoj.

Oferto N-ro 519. **Pervapora kuirpoto** „Frank-Umbach“ (ŝparigas 50% de tempo kaj hejtaĵo). La prezoj estas reduktitaj jene: RM 12.50 por la 3½-litra, RM 13.50 por la 5-litra, RM 15.50 por la 7-litra poto, inkl. pakumaĵo, afrankite germana limo. Vendistoj ricevas 20—30% rabaton (laŭ la mendita kvanto). Aluminiaj enmetaĵoj (por ebligi samtempan kuiron de kelkaj manĝaĵoj) serio da 3 enmetaĵoj de RM 5.50 ĝis RM 8.50.



Oferto N-ro 530. **Naztukoj por sinjorinoj** por 6 pecoj (30×30 cm) RM 0.90; por sinjoroj (39×39 cm) RM 1.20. Antaŭtukoj, porinfanaj vestaĵoj, puntoj, brodaĵoj, kurtenoj, tolaĵoj, tablokovraĵoj je plej malaltaj prezoj per KEU Plauen i. V. (Germ.), Krähenhügelstr. 13.

Oferto N-ro 563. **Nova ĉarma ludaĵo** por infanoj. Konstrukesto kun novspecaj brikoj el ligno. La brikoj estas tiel aranĝitaj, ke unu briko estas facile alfiksebla al la alia ktp. 12 kestoj kun po 20 ĝis 200 brikoj, RM 6.— ĝis 48.— la dekduo da kestoj. Liverata en ruĝe tegita kartonkesto, loko fabriko, ekskl. pakumaĵon. Rabato: 50% al pograndistoj, 25% al vendistoj.

---

**Ni serĉas**

por franca horloĝisto bracelethorloĝojn kaj vekhorloĝojn. Sendu prezojn por po 10 pecoj; krome sudfruktojn por kelkaj interesatoj.

---

**Nigra listo.**

Ni strekas s-ron Perlet, Bern, kiu plenumis ĉiujn siajn devojn.

---


**Manuskripto afable kontrolita de Karl Minor, LK, Hamburg, Germ.**

## MIMOSA-foto-paperoj

estas mondfamaj, ĉar ili estas bonegaj; ili ŝparigas penon kaj tempon kaj estas pro tio malmultekostaj en la uzado

## Mimosa-filmoj

havas Mimosa-kvaliton. Riceveblaj en ĉiuj bonaj vendejoj de fotoartikloj



Bildo de „Planeta“, rapidpresmaŝino kun duturna cilindro


## PLANETA PRESMAŜINOJ

por libro- kaj „Offset“- preso.

**DRESDEN-LEIPZIGER**

Schnellpressenfabrik A. G., Coswig Bez. Dresden

## DIAMANT-malpeza motorciklo



kun „Sachs“- motoro

Plej moderna interkomunikilo

◆

Malkara uzado

◆

Grandega laborkapablo

**ELITE-DIAMANTWERKE Aktiengesellschaft**

**SIEGMAR in Sachsen (Germanujo)**

## Fantaziaj starhorloĝoj

*en ĉiuj grandoj kaj konstruoj kun ujoj metalaj kaj galalitaj, je moderaj prezoj. Haveblaj ĉe*

**BRAC A.-S.**

Horloĝa fabrikejo

BREITENBACH, Svis.

*Katalogoj kaj prezaroj estas je via dispono. Liveroj rekte de provizejo.*


*La urbo Oederan apud Chemnitz (Germanujo) disponas pri*

### *kelkaj fabrikejoj vendeblaj*

*je treege malalta prezo! Bona okazo por eksterlandaj industriistoj, fabriki — por eviti importdoganon — en Germanujo mem!*

*Demandu detalojn de la Bürgermeister (urbestro) Oederan, Saksujo (Germanujo)*

*Korespondo en Esperanto*




## Elektran fluon sen kostoj de priservo

liveras

## AEG-TURBINAMO

La laborenergion por tiu ĉi lumagregato, kies generatoro aŭtomate tenas la tension konstanta, liveras akvofaloj ekde 2.5 metroj.

**Allgemeine Elektricitäts-Gesellschaft Berlin NW 40**



Malaltaj aĉetkostoj

Simpla muntado


Granda funkcisekureco

Laborado sen priservo

## CURT MÖBIUS

Hanau a. M. (Germanujo)

Poŝtkesto 2



fabrikas kaj liveras

FLUGMODELOJN

KONSTRUPARTOJN

k. t. p. Postulu Katalogon!

Fontplumo

## „JULIANUS“

**(Oficiala memoraĵo de la Itala Esp.-Kongreso en Como)**

**kun plumpinto el vera iridio, plumo el vera 14-karata oro, afrankite ĉien, liroj ital. 15.—**

**Uzadklarigo en Esperanto!**

**JULIUS REICHARDT,**

**UDINE, ITALUJO**

DRESDEN (Germ.)

Lit- kaj tablotolaĵo

Subvestoj por sinjorinoj

Ŝtofoj por subvestoj

Propra fabrikado

## Müller & C. W. Thiel

PRAGERSTRASSE 35

PRESO: HEROLDO DE ESPERANTO. KÖLN